



TEA-BULTENO

2^a JARO

JULIO 1999

NUMERO 7



AGENDO



- 1 Ĵ
- 2 V Malnovepokaj diapozitivoj
- 3 S
- 4 D
- 5 L
- 6 M Ordigo de asocia arkivo
- 7 M
- 8 Ĵ
- 9 V Ludkarta vespero
- 10 S
- 11 D
- 12 L
- 13 M Ordigo de asocia arkivo
- 14 M
- 15 Ĵ
- 16 V Sub lupeo nia tradukaĵo!
- 17 S
- 18 D
- 19 L
- 20 M Ordigo de asocia arkivo
- 21 M
- 22 Ĵ
- 23 V Ĝis revido post Vjetnamio!
- 24 S
- 25 D
- 26 L
- 27 M Ordigo de asocia arkivo
- 28 M
- 29 Ĵ
- 30 V Ludkarta vespero
- 31 S



FORPISIS LA VERKISTO FULVIO TOMIZZA

Pier Giorgio Soranzo

La 21^{am} de majo 1999 forpasis en Triesto, pro hepata malsano, la verkisto Tomizza, konata ne nur en Eŭropo sed ankaŭ ekster ĝi.

Ampleksa estas lia verkaro, komenciĝinta en 1960 per la romano **MATERADA**; sed mi deziras rimarkigi, ĉi tie, lian esperantisman animon, ĉar li ĉiam celis starigi ekvilibron inter tiuj, kiuj kovis malamon kaj tiuj, kiuj meditis venĝon: «Li restis sur la linio de la landlimo por triki ligojn, konstrui pontojn, proksimigi malamikajn sintenojn», diris pastro Pietro Zovatto dum la funebra parolado.

Sed ĉi tiu pacemo ne estis taŭge komprenata, ĉar li estis konsiderata «slavo» fare de kelkaj italoj kaj «italo» fare de kelkaj slavoj. Kaj tio, ĉiam turmentis lin.

Li ne konis rekte Esperanton, sed plej afable kaj malavare li donis la permeson aperigi la esperantan tradukon de lia romano **MATERADA**. Materada estas la nomo de la istria vilaĝo en kiu li naskiĝis kaj en Materada li nun ripozas en la familia tombo.

La romano **MATERADA** (Edistudio, 1983) rakontas la tragedian eliron de la istrianoj el la teroj kiuj, pro la Interkonsenta Memorando de Londono en 1954, fariĝis posedaĵo de la tiama Jugoslavio.

Tiu romano finiĝas per preskaŭ testamentaj vortoj: «Kaj mi pensis pri niaj mortintoj... pri tiu aro da homoj naskitaj, vivintaj kaj fine sepultitaj ĉi tie sube... Duono de hektaro de ĉi tiu senŝtona tero sufiĉis por ili ĉiuj, tutcerte ĝi sufiĉos ankaŭ por ni kaj por niaj filoj.»

GRAVA INFORMO PRI 11^A AA KONFERENCO

Pro organizaj kialoj estis ŝanĝita la dato de la aranĝo:
ĝi okazos

de la 7^a ĝis la 10^a de oktobro 1999
en **Medulin/Pula**, Kroatio.

Ĉio alia restis sama: do, vi havas iom pli da tempo por decidi pri partopreno, sed memoru, ke per frua aliĝo vi helpos la organizanton en lia laboro, por indaj akcepto kaj preparo de interesaj programoj, ĉefe turismaj. La aliĝiloj, kune kun ĉiuj informoj pri loĝado, haveblas ĉe **TEA**-sekretariejo kaj la organizanto: Kroata Esperantista Unuiĝo - p/a Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio; tel: +385 01 3745502 - Retadreso: hes@esperanto.nu

Pri nia lingvo

Akademio de Esperanto starigis komisionon, al kiu povas turni sin ĉiu Esperanto-uzanto per difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la komisiono probable povos respondi relative rapide; ĉe komplikaj gramatikaj problemoj kutime daŭros pli longe. La respondoj ne estos decidoj de la Akademio, sed rekomendoj de la konsult-komisiono. Tamen la Akademio esperas, ke utilos ĉi tiu rapida servo, pri kies manko ofte oni plendis. Viajn klare formulitajn kaj konkretajn demandojn sendu al la direktoro de la **Akademia Konsultejo**, per ordinara letero, ret-poŝte aŭ telefakse: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, rete: maul@newsfactory.net; (nur inter 10^a kaj 12^a h. Met) + 49 (0)821/520385.

La komisiono petas, nepre ne sendi bagatelajn demandojn, kiujn povas respondi ĉiu sperta esperantisto, serĉante en vortaroj kaj aliaj konsult-libroj. Siajn rekomendojn la **Konsultejo de la Akademio** komunikos ne nur al demandintoj, sed ankaŭ al la Esperanto-gazetaro.

Rekomendoj de la Konsultejo de Akademio de Esperanto

Ricevinte demandojn pri la vortoj *inline skates*, *snowboard*, *halfpipe*, *mountain bike*, *game boy*, la Konsultejo komunikas la jenajn rekomendojn:

Por *incline skates*: **ruĵŝuo**, jam vaste uzata, estas ŝuo kun radetoj aranĝitaj unu- aŭ duvice; do, oni rekomendas - **unuvicej ruĵŝuoj**.

Por *snowboard*: **glit(o)tabulo** - unuobla skio, sur kiu starante ambaŭkrure oni glitas laŭ neĝa deklivo. Tolerabla ŝajnas ankaŭ la termino **neĝtabulo**.

Por *halfpipe*: **duontubo** - tiuforma instalaĵo por pendole veturi en ĝi per rultabulo.

Por *mountain bike*: **mont(o)biciklo**, **montarbiciklo** - fortika biciklo taŭga por veturi sur natura kaj dekliva tereno (terenbiciklo).

Por *game boy* (varnomo): **ludkomputil(et)o** - tiuspeca portebla aparateto kun ludprogramo, precipe por infanoj. Krome oni demandis, ĉu la terminoj **poŝtelefono** kaj **kompaktdiskilo** estas akcepteblaj. Tion la konsulta komisiono jesis, aldonante ke por portebla kompaktdiskilo sufiĉas kutime ankaŭ la termino **poŝdiskilo**.

La konsulta komisiono atentigas, ke tiuj ĉi rekomendoj ne estas decido de la Akademio de Esperanto.



Tradukado: ĉu problemoj?



Ju pli la mondo evoluas, ju pli distancoj mallongiĝas, des pli urĝaj fariĝas homaj interrilatoj. Sed tiuj rilatoj stumblas ĉe gravega baro: la lingvoproblemo. Ĝis nun oni uzas ofte la anglan (aŭ la usonan), sed tradukado ne ĉiam estas malmultekosta. Rimedon oni pensis eltrovi uzante la komputilojn. Sed ĉu la komputiloj havas cerbon? Ĉu ili kapablas memstare rezoni, kompreni? Legu, legu...

El artikoleto aperinta en *Focus* - N° 81 - julio 1999

Musaj «pilkoj» kaj softvaro de tradukado
La komputila *mouse* (muso), franclingve, estas *souris*, hispane *raton*, germane *maus*, kaj nur ni italoj, anstataŭ nomi ĝin *topo*, diras *mouse*.

Uz-regularo. Ĉi tiu fakto, tamen, estas ignorata de la programo utiligata ĉe IBM, cele al aŭtomata tradukado de gvidlibro necesa por internaj bezonoj. En la italingo de la teksto, origine anglo-usona, legeblas jenaj frazoj, kie grave rolas tiu besteto: "La pilkoj de la musoj, ekde hodiaŭ, estas je dispono kiel vicpartoj. Se via muso havas iom da malfacilo korekte funkcii, aŭ ĝi funkcias malregule, intermite, povus esti ke ĝi bezonas alian pilkon."

Superdotitaj. "Antaŭ ol daŭrigi, vi informiĝu pri kiu tipo de pilkoj estas bezonata por via muso. Sufiĉas ekzameni ĝian suban parton. La pilkoj de usonaj musoj estas kutime pli grandaj ol tiuj de la transoceanaj musoj. (...) Oni rekomendas al la kvalifikita personaro ĉiam kunporti, rezerve, duon da pilkoj, tiel ke estu daŭre garantiata la maksimuma kontentiĝo de la klientaro."



Esperanto radie

Pasintan marton okazis en Kubo tutlanda kongreso de ĵurnalistoj, dum kiu oni pritraktis la situacion de radiostacioj. En ĝi partoprenis aŭtoritatoj kaj funkciuloj de radioj, televizioj, gazetoj ks, entute kelkcento da fakuloj.

Prezidento Fidel Castro aktive partoprenis kaj interesiĝis pri kurtondaj elsendoj. La reprezentantoj de Radio Havano tie raportis i.a. pri la fakto, ke ĝiajn programojn oni elsendas en naŭ lingvoj, el kiuj ankaŭ Esperanto. Sekve de tio, oni interkonsentis pri daŭra subteno de la radiostacio kaj pri plibonigo de la teknikaj kondiĉoj. Ĉio ĉi donis entuziasmon kaj novan elanon al la radia skipo, kiu senpacience atendas la realigon de la promesoj. Intertempe ĉiuj esperantistoj, kaj speciale la kolegoj de AERA, estas petataj pli intensigi la kontaktojn kun Radio Havano, per konstanta sendado de korespondadoj, ret-mesaĝoj, gazetoj, ĵurnaloj, bultenoj ks, kio konvinkos la respondeculojn, ke la Internacia lingvo estas reala voĉo al la tuta mondo.

Jen indikoj pri la dimanĉaj elsendo-horoj (laŭ UTC):

07.00-07.30 9820 Azio Pacifika, Norda Ameriko

15.00-15.30 11760 Ameriko, Karibio

19.30-20.00 13715 Eŭropo, Mediteraneo

22.00-22.30 13715 Eŭropo, Mediteraneo

23.30-24.00 11760, 6070 Ameriko, Karibio

Kontribuaĵojn sendu al: Radio Havano - E-redakcio - pf. 6240 - Havano; fakse: 537-338729; @: rhc@radiohc.org

Kaj nun ankaŭ en Sancti-Spiritus!

Ekde la 22^a de aprilo, ekis unua radioelsendo pri Esperanto, danke al aktiviĝo de Yoandra Rodriguez Labrada kaj Norberto Diaz Guevara. Enkadre de kultur-programo **KVARA DIMENSI**O, ĉiuĵaŭde okazas 5-minuta elsendo de priesperantaj informoj. Tempo kaj daŭro de tio dependos kompreneble de viaj apogo kaj reago. Do, nepras sendado de leteroj aŭ bildkartoj, Esperante aŭ hispane, al: Emisora Radio Sancti-Spiritus - Programa CUARTA DIMENSIÓN - Sección de Esperanto - Circunvalación, Olivos 1 - Sancti-Spiritus - Cuba. Mesaĝojn adresu al Norberto Diaz Guevara: esperanto@esiss.columbus.cu

**11-a ALP-ADRIO ESPERANTO KONFERENCO
MEDULIN/PULA
07 -10/10.1999**

ALIĜILO

Persona(j) nomo(j) _____
 Familia(j) nomo(j) _____
 Naskiĝdato _____ viro/virino (forstreku)
 Nomo de kunulo aliĝanta samtempe _____
 Adreso (strato kaj numero) _____
 P.K. _____ Urbo _____ Lando _____
 Telefono _____ Fakso _____ Retadreso _____

Mi alvenos per _____ la _____
 Mi foriras per _____ la _____

- Mi petas informojn pri plilongigo de la restado/datoj: _____
 Mi bezonas specialan dieton _____
 Mi deziras manĝi vegetare _____
 Mi pretas kontribui al la konferenca programo per: _____

 Mi deziras loĝi en 2-lita ĉambro kun _____

!!! Eblas aldoni trian liton por infano malpli ol 12-jaraĝa.
 Bv. sendi informojn. JES NE

- Mi preferas loĝi sola kaj krompagi 30%

M E T U X			07.10	08.10	09.10	10.10	
	Tagoj						
	Tranoktado						
	Duonpensiono						
	Plena pensiono						

Mi interesiĝas pri jenaj ekskursoj:

- Brijuni
 Istriaj urboj kaj vilaĝoj
 Pula

Dato _____ Subskribo _____
 Post la ricevo de via aliĝilo, la organizanto sendos al vi konfirmilon kaj pliajn informojn pri la Konferenco, kun konsiloj kiel atingi la konferencurbon.

Bonvenon al ĉiuj Esperantistoj el la Alp-Adrio Komunumo kaj el la tuta mondo !



**Temo: KULTURAJ RAJTOJ DE ETNAJ MALPLIMULTOJ
 EN ALP-ADRIO KOMUNUMO
 Aŭspicianto: Alp-Adria Laborkomunumo**

adreso de la organizanto:
 Kroata Esperantista Unuiĝo, p/a Sveti Duh 130
 HR- 10000 Zagreb, Kroatio, ☎385 1/37 45 052
 retadreso: hes@esperanto.nu

Tema parto:

Vivi en la Alp-Adrio Komunumo, ne signifas nur ĝui la diversecon de la klimato kaj naturo, sed same vivi en multkultura medio.
 Preskaŭ ne ekzistas regionoj da la Komunumo, kie ne eblas renkonti pluretnismon.
 Restas la demando:
 Ĉu ni konas niajn alinaciajn najbarojn, samurbanojn, samlandanojn?
 Ĉu ni iam partoprenis iun aranĝon kiun organizis ilia nacia komunumo?
 Ĉu ni iam pensis pri iliaj rajtoj?
 Jen nur kelkaj demandoj al kiuj ni provos respondi dum la ĉi jara Alp-Adrio Esperanto Konferenco.

Konferencloko:

Medulin, kie troviĝos nia konferencejo, situas 10 km. de **Pula** ĉe la marbordo. Ĝi estas konata pro belaj plaĝoj (unu sternaĝas sub la fenestroj de viaj ĉambroj). Ni esperas, ke krom ĝenerala kunsido kaj la traktado de la tema parto, ni havos eblecon ĝui la naturan etoson. La ekskursoj nin povas direkti al la insularo Brijuni (Nacia parko) aŭ pluraj ĉarmaj istriaj urbetoj. Ne forgesu, tiatempe ankoraŭ temperaturo estas inter 15 kaj 20 gradoj C. kaj similan varmon havas ankaŭ la maro.

Medulin estas atingebla:

- per la **urba buso** el Pula (bushaltejo en Pula proksime al la fervoj kaj busstacidomo kaj ĉe la hotelo
- **buso**: al Pula per kelkaj interurbaj kaj internaciaj linioj (italaj, slovenaj)
- **trajne**: al Pula - **aviadile**: al Pula, Rijeka - **ŝipe**: al Pula, Rijeka - **glitŝipo**: Trieste-Pula

Provizora programo:

07.10 **jaŭdo**

09.00-17.00 alveno da la konferencanoj

11.00 ekskurso por fruaj alvenintoj

17.00 inaŭguro de la filatela ekspozicio

17.30 kunsido de AA-komisionoj

10.30 vespermanĝo

20.30 interkona vespero

08.10 vendredo

07.30 matenmanĝo

09.00 oficiala inaŭguro de la Konferenco
tema programo I

12.30 tagmanĝo

13.30 ekskurso

20.00 vespermanĝo

21.00 kultura programo

09.10 sabato

07.30 matenmanĝo

09.00 ĝenerala kunsido I

10.30 tema programo II

12.30 tagmanĝo

14.00 tema programo III

18.00 kunsido de AA-komisionoj II

19.30 vespermanĝo

20.30 kultura programo

10.10 dimanĉo

07.30 matenmanĝo

08.30 diservo

10.00 ĝenerala kunsido II, konkludoj,
rezolucio, fermo de la konferenco

13.00 tagmanĝo

aldonaj programeroj

→ libroservo

→ filatela ekspozicio <Esperanto en Alp-Adrio>

→ filatela stampo en la poŝtoŭficejo

→ ekspozicio

Sendu filatelaĵojn, E-poŝtkartojn ĝis la 31-a de aŭgusto

Partoprenu:

→ foto-konkurso (minimuma formato 21x29) Temo: Vivo de etnaj malplimultoj

Limdato: la 31-a de aŭgusto

Al la konkursaĵoj aldonu: nomon kaj familian nomon, adreson, aĝon, mallongan priskribon de la verko.

Ekskursoj:

- la Nacia parko Brijuni

- Istriaj urbetoj - rondveturo

- Pula (nur kostoj de la urba transporto)

La aliĝo al la ekskursoj estas momente nur orientiga. Se pluraj personoj interesiĝos pri pli ol unu ekskurso ni modifos la programon por aldoni plian ekskurson.

Por bone organizi la ekskursojn helpas la mencio pri la alveno kaj foriro.

Orientiga prezo 15 €

Aliĝkotizo

aliĝperiodo	I° 30.06.99	II° 04.09.99	III° post 05 09 99
konferencano	10 €	15 €	25 €
kunulo	8 €	11 €	15 €
junulo	5 €	7,5 €	10 €

kunulo: tiu kiu loĝas samadrese kun la aliĝanto; junulo: tiu, kiu je 1.4.99 estas malpli ol 27-jara;

grave: eblas unutage partopreno kontraŭ 10 €, sendepende de la supraj kategorioj

La aliĝkotizo ne estas repagebla.

La aliĝkotizo inkluzivas partoprenon en la laboraj kaj kulturaj programeroj de la Konferenco.

La aliĝkotizo ne inkluzivas manĝojn, loĝadon, ekskurson kaj aliajn pagendajn aferojn.

La aliĝo validas ekde la dato de la pago.

Loĝado

Ni proponas al vi loĝadon en 2-litaj ĉambroj en la tri-stela hotelo apud la marbordo. La hotelo posedas eksteran kaj internan bazenojn, keglejon, trim-kabineton, dancterason.

unu persono/unu tago	prezoj
Tranoktado/matenmanĝo	16,5 €
Duonpensiono (vespermanĝo)	21 €
Plena pensiono	25 €

grave: deviga antaŭpago ĉe la mendo minimume 30%, reston eblas pagi surloke

Eblas plilongigi la restadon, antaŭ aŭ post la konferenco, sed nepre tion indiku en la aliĝilo por ĝui la konferencajn prezojn.

Proksime al la hotelo troviĝas kampadejo. Se vi deziras loĝi tie, bv. kontakti nin pro pliaj informoj.

La aliĝilon, mendojn kaj pagojn sendu al:

Lando	Adreso	Pagmaniero
Aŭstrio	s.ro Martin Stuppniĝ Esperantostr.7/1 9601 Arnoldstein	Konto: Raifeisenbank Arnoldstein BLZ k. n-ro 30.003.511-Stuppniĝ Martin
Italio	Triesta Esperanto-Asocio C.P. 601 34100 Trieste Centro	Poŝtĉeko 10834349
Kroatio	Kroata Esperantista Unuiĝo, p/a Sveti Duh130, 10000 Zagreb	Poŝtmandato
Slovenio	Slovena Esperanto-Ligo Tavčarjeva 2, 1001 Ljubljana	Poŝtmandato
Ĉiuj aliaj	Kroata Esperantista Unuiĝo, p/a Sveti Duh 130, 10000 Zagreb	kontaktu la organizantojn por pliaj instrukcioj

JULIO 1999

Lundo		5	12	19	26
Mardo		6	13	20	27
Merkredo		7	14	21 ANTAÚTAGO DE TISHA B'AV	28
Ĵaŭdo	1	8	15	22 TISHA B'AV	29
Vendredo	2	9	16	23	30
Sabato	3	10	17	24	31
Dimanĉo	4	11	18	25	

JULIO 1999

Lundo		5	12	19	26
Mardo		6	13	20	27
Merkredo		7	14	21 ANTAÚTAGO DE TISHA B'AV	28
Ĵaŭdo	1	8	15	22 TISHA B'AV	29
Vendredo	2	9	16	23	30
Sabato	3	10	17	24	31
Dimanĉo	4	11	18	25	

5759 HEBREA JARO

21-22 - TISHA B'AV. La hebrea popolo rememoras la detruadon de la Jerusalema templo fare de romianoj en la jaro 70^a p.K. Kelkaj hebreoj elvokas ankaŭ la momenton, kiam *Nabucodonosor* ruinigis, unuafoje, templon en 586^a a.K. Temas pri fasta kaj funebra tago: la sinagogon oni senigas je ĉiuj ĝiaj ornamaĵoj.

2559 BUDHISTA JARO

2055 HINDUISMA JARO

RATH YATRA - En tiu ĉi monato okazas la plej spektakla hinda festivalo, dediĉita al *Sri Jagannath* (Dio de la Universo). Ĝi konsistas el sugestoplena parado de gigantaj ĉaroj tra la ĉefaj urbo-stratoj. La plej pompa celebrado estas aranĝita en *Puri*, urbo kie imponas la plej antikva templo, konstruita je la honoro de la Dio. Ĝi estas, tiuokaze, la precipa pilgrimada celo.

1999 KRISTANA JARO

1420 ISLAMA JARO

5759 HEBREA JARO

21-22 - TISHA B'AV. La hebrea popolo rememoras la detruadon de la Jerusalema templo fare de romianoj en la jaro 70^a p.K. Kelkaj hebreoj elvokas ankaŭ la momenton, kiam *Nabucodonosor* ruinigis, unuafoje, templon en 586^a a.K. Temas pri fasta kaj funebra tago: la sinagogon oni senigas je ĉiuj ĝiaj ornamaĵoj.

2559 BUDHISTA JARO

2055 HINDUISMA JARO

RATH YATRA - En tiu ĉi monato okazas la plej spektakla hinda festivalo, dediĉita al *Sri Jagannath* (Dio de la Universo). Ĝi konsistas el sugestoplena parado de gigantaj ĉaroj tra la ĉefaj urbo-stratoj. La plej pompa celebrado estas aranĝita en *Puri*, urbo kie imponas la plej antikva templo, konstruita je la honoro de la Dio. Ĝi estas, tiuokaze, la precipa pilgrimada celo.

1999 KRISTANA JARO

1420 ISLAMA JARO